

EL POPOLA ĈINIO

人民中國報道

EN TIU ĜI NUMERO:

Kiuj Estas la Plej Amindaj
Homoj
Karbomina Industrio en Nova
Ĉinio
Komenciĝas Feliĉa Vivo por la
Minoritatoj
Historio de Fera Ĉeno
Trairejo No 6 — Laborista
Teatraĵo

Monata Informa Bulteno Eldonata de Fremdlingva Eldonejo
Redakcio kaj Administracio: 26 Kuo Hui Chieh, Peking, Ĉinio

VOL. II N-RO 6
JUN. 1951

Tibeto Revenas al la Granda Ĉina Familio

La historia Kontrakto de la Centra Popola Registaro kaj la Loka Registaro de Tibeto, kiu alportas la pacan liberigon de Tibeto, subskribiĝis en Pekino la 23an de majo en la antaŭa Imperia Palaco en atmosfero de soleneco kaj amika unueco. Per la subskribo de la Kontrakto, la Tibeta popolo liberiĝis sin por ĉiam el la katenoj de imperiismo kaj revenis al la granda familio de amika kunlaboro de la diversaj nacioj de Ĉina Popola Respubliko.

Antaŭparolo de la Kontrakto

"La Tibeta nacio," diris la Kontrakto, "estas unu el la nacioj kun longa historio interne de la limoj de Ĉinio kaj, kiel multaj aliaj nacioj, ĝi plenumis sian gloran ĉion en la procezo de kreado kaj disvolvo de la granda patrolando. Sed dum la lastaj pli ol 100 jaroj, imperiistaj fortoj penetriĝis en Ĉinion, kaj sekve ankaŭ en la Tibetan regionon kaj faris ĉiajn trompojn kaj provokojn. Kiel antaŭaj reaciaj registaroj, la Kuomintang reacia registaro daŭrigis politikon de naci-subpremo kaj naci-malakordigo, kaŭzante dividiĝon kaj malunuecon inter la Tibeta popolo. Kaj la Loka Registaro de Tibeto ne kontraŭis al la imperiistaj trompoj kaj provokoj, kaj adoptis nepatriotisman sintenon kontraŭ la granda patrolando. Sub tiaj kondiĉoj, la Tibeta nacio kaj popolo droniĝis en profundegon de sklaviĝo kaj sufero.

"En 1949, la Liberiga Milito de la Ĉina Popolo landskale akiris bazan venkon, renversis la internan komunan malamikon de ĉiuj nacioj—la Kuomintang reacia registaro, elpelis la komunan eksteran malamikon de ĉiuj nacioj—la agresaj imperiistaj fortoj. Sur tiu ĉi bazo, anonciĝis la fondo de la Ĉina Popola Respubliko kaj la Centra Popola Registaro. Konforme al la Komuna Programo aprobita de la Politika Konsilia Konferenco de la Ĉina Popolo, la Centra Popola Registaro deklaris ke ĉiuj nacioj interne de la limoj de la Ĉina Popola Respubliko estas egalaj, ke ili unuigu kaj interhelpu kaj kontraŭu al imperiismo kaj sia interna komuna malamiko, ke la Ĉina Popola Respubliko fariĝu granda familio de amikeco kaj interhelpo de ĉiuj siaj nacioj; ke interne de la granda familio de ĉiuj nacioj de la Ĉina Popola Respubliko, nacia regiona aŭtonomio efektiviĝu en areoj kie naciaj minoritatoj koncentriĝas, ĉiuj naciaj minoritatoj havu liberon disvolvi siajn parolajn kaj skribajn lingvojn kaj konservi aŭ reformi siajn kutimojn, morojn kaj religiajn kredojn, kaj la Centra Popola Registaro helpu ĉiujn naciajn minoritatojn disvolvi sian konstruan laboron politikan, ekonomian, kulturen kaj edukon.

"De tiam, liberiĝis ĉiuj nacioj interne de la lando, krom tiuj en la regionoj de Tibeto kaj Tajvan. Sub la unueca gvidado de la Centra Popola Registaro kaj la senpera gvido de la superaj Popolaj Registaroj, ĉiuj naciaj minoritatoj jam plene ĝuas la rajton de nacia egaleco kaj efektiviĝis aŭ efektivas naciajn regionajn aŭtonomion.

"Por sukcese elimini la influon de agresaj fortoj imperiistaj en Tibeto, efektiviĝi la unuigon de teritorio kaj suvereneco de la Ĉina Popola Respubliko kaj defendi la landlimojn, por liberiĝi la Tibetan nacion kaj popolon kaj revenigi ĝin al la granda familio de la Ĉina Popola Respubliko por ĝui la saman rajton de nacia egaleco kiel ĉiuj aliaj nacioj en la lando kaj disvolvi sian politikan, ekonomian, kulturen kaj edukon laboron, la Centra Popola Registaro, kiam ĝi ordonis la Popolan Liberigan Armeon marŝi en Tibeton, sciigis la Lokan Registaron de Tibeto alsendi delegitojn por konduki interparolojn por fari kontrakton pri rimedoj por paca liberigo de Tibeto. En la lasta parto de aprilo, 1951, la delegitoj kun plenaj rajtoj de la Loka Registaro de Tibeto alvenis al Pekino. La Centra Popola Registaro nomis reprezentantojn kun plenaj rajtoj por konduki interparolojn sur amika bazo kun la delegitoj de la Loka Registaro de Tibeto. Rezulte de la interparoloj, ambaŭ partioj konsentis establi ĉi tiun kontrakton kaj garantiis ĝian efektigon."

Parolado de Ĉu Teh
Post la subskribo de la Kontrakto, parolis Ĉu Teh, Vicprezidanto de la Centra Popola Registaro. Li diris:


"Tio estas venko de la granda unueco de la ĉinaj nacioj, kaj samtempe severa malvenko por la agresaj imperiistaj influoj kiuj atencas obstrukci kaj subfos la pacan liberigon de Tibeto. La agresaj imperiistaj fortoj, tamen, ne akceptos sian malvenkon memvole. Ili povas daŭre entrepreni novajn obstrukciajn kaj subfosajn agojn. Kontraŭ tio la popolo de la tuta lando, des pli la Tibeta popolo, devas vigle atenti, kaj precipe la Loka Registaro de Tibeto devas tre vigle singardi. Sed kiajn ajn komplotojn kaj intrigojn povas kovi la imperiistoj, ili estas

kondamnitaj al plena malvenko antaŭ la potenco forto de la Ĉina popolo, inkludanta la Tibetan popolon.

"La Centra Popola Registaro certe helpos la Tibetan popolon forviŝi la influon de imperiismo en Tibeto, efektiviĝos la unuecon de teritorio kaj suvereneco de la Ĉina Popola Respubliko, kaj defendos la landlimojn de la granda patrio, ke la Tibeta nacio kaj popolo por ĉiam akiru liberigon, revenu al la familio de la granda patrolando kaj, helpate de la Centra Popola Registaro kaj la han-nacio, disvolvu paŝon post paŝo sian propran politikan, ekonomian, kulturen kaj edukon laboron kaj pliatigu sian vivnivelon."

Parolado de Prezidanto Maŭ
Vespere la 24an de majo, Prezidanto Maŭ Ze-tung de la Centra Popola Registaro okazigis festenon por celebri la Kontrakton. En sia malferma parolo li diris:

"Dum kelkcent jaroj la diversaj nacioj en Ĉinio ne estis unuigitaj. Precipe, estis malunueco inter la han-nacio kaj la Tibeta nacio. Ankaŭ



Tibeto — Ĉina Teritorio

Tibeto estas en la plej sudokcidenta parto de Ĉinio. Ĝi havas areon de ĉirkaŭ 100,000 kvadrataj km. Ĝi estas la plej alta lando en la mondo, meznombro ĉirkaŭ 5,000 metrojn super marnivelo. Tibeto limiĝas okcidente de Kaŝmir kaj Ladan de Hindio, kaj sude de Hindio, Nepalo kaj Butano. El ĝia loĝantaro de ĉirkaŭ tri kaj tri kvaronoj da milionoj, la plejmulto estas nomadoj.

En Tibeto estas malmulta industrio, sed abundaj mineralaj riĉfontoj, kiel oro, argento, fero, kupro, sodo, potaso kaj borakso. Krom brutbredado kaj agrikulturo, estas iom da ŝpinado, teksado kaj trikado de lano.

La religio de la tibetanoj estas lamaismo, formo de budaismo. Estas pli ol 3,000 monaĥejoj kaj la nombro de lamaoj estas 300,000.

Lasa estas la politika, religia, kultura kaj komerca centro de Tibeto, kaj ĉi tie estas la 13-etaĝa palaco, en kiu vivas la Dalaj Lama.

La intimaj rilatoj de Ĉinio kun Tibeto komenciĝis en la 8a jarcento. De post 1794, Tibeto fariĝis konsistiganta parto de Ĉinio.

Sed la imperiistaj landoj longe kovis atencojn pri ĉi tiu plej sudokcidenta parto de Ĉinio. Okupinte Hindion, Britio prenis la pluan paŝon provi forrabi Tibeton de Ĉinio, invadante Tibeton en 1887 kaj 1904. La popolo de Tibeto levigis batali brave kontraŭ ĉiu fremda invado. Sed fremdaj imperiistoj neniam forlasis sian intencan kunlabori kun reaktiuloj en Tibeto por ekspluati kaj subpremi la Tibetan popolon. Nur nun la paca liberigo de Tibeto por ĉiam frakasas ilian atencon.

estis malunueco interne de Tibeta nacio. Tio estis la rezulto de la regado de la reaciaj registaroj manĉua kaj Ĉiang Kaj-ŝeka, kaj ankaŭ la rezulto de imperiistaj provokoj kaj semado de malakordo.

"Nun la fortoj gvidataj de la Dalaj Lama kaj la fortoj gvidataj de Panĉen Ngoertheni jam kune unuiĝis kun la Centre Popola Registaro. Tio atingiĝis nur post kiam la ĉina popolo renversis imperiismon kaj la enlandan reacion regadon. Ĉi tiu unueco estas unueco frata, kaj ne tiu de unu partio subpremanta alian. Ĉi tiu unueco estas la rezulto de komunaj penoj de ĉiuj flankoj. De nun, bazite sur ĉi tiu unueco, ĉiuj niaj nacioj disvolviĝos kaj progresos en ĉiuj sferoj politika, ekonomia, kultura kaj aliaj."

Paroladoj de Panĉen kaj Ngaboŭ Ngavang Ĝigme

Post la parolo de Prezidanto Maŭ Ze-tung, Panĉen Ngoertheni diris: "Problemo koncerne malsamajn naciojn interne de Ĉinio, la Tibeta problemo, kiu restis ne solvita dum multaj jaroj, nun sukcese solviĝis sub la gvidado de Prezidanto Maŭ Ze-tung, la brila gvidanto de la popolo de ĉiuj nacioj en Ĉinio. La paca liberigo de Tibeto estas plej ĝoja okazaĵo en la granda familio de ĉiuj nacioj en Ĉinio. La unueco de la Centra Popola Registaro, la Dalaj Lama kaj Panĉen Lama povas efektiviĝi nur sub la gvidado de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la Popola Registaro."

Kalun Ngaboŭ Ngavang Ĝigme, la ĉefa delegito de la Loka Registaro de Tibeto diris: "Fremdlandaj imperiistoj kaj Kuomintang disvastigas famojn en Tibeto, dirante ke la Komunista Partio kaj la Popola Registaro estas nebonaj, kaŭzante timon inter la Tibeta popolo. Tamen dum la interparoloj, ni persone ekkomprenis ke la famoj de la imperiistoj kaj Kuomintang estas absolute kontraŭaj al la faktoj. Hodiaŭ niaj pacaj interparoloj jam plene sukcesis. La unueco de ĉiuj frataj nacioj en Ĉinio estas senprecedenca kaj la unueco de Tibeto mem estas ankaŭ senprecedenca. Tio estas la rezulto de la gvidado de Prezidanto Maŭ Ze-tung. Ni varme subtenas la gvidadon de Prezidanto Maŭ Ze-tung, trinkas pro la sano de Prezidanto Maŭ Ze-tung, la granda gvidanto de la popolo de ĉiuj nacioj en Ĉinio, kaj trinkas pro la unueco kaj sano de la Dalaj Lama kaj Panĉen Budao!"



Prezidanto Maŭ Ze-tung intime interparolis kun Kalun Ngaboŭ Ngavang Ĝigme, la ĉefa delegito de Tibeto.

La subskribo de la Kontrakto pri la Rimedio por la Paca Liberigo de Tibeto alportas epokfarantan ŝanĝon en la historio de la Tibeta nacio kaj la historio de ĝiaj rilatoj kun la patrolando kaj enkondukas brilan kaj prosperan estonton por la Tibeta nacio kaj popolo. Ni entuziasme gratulas la Tibetan nacion por ĝia paca liberigo kaj ĝia brila kaj prospera estonto.

Vivu la granda unueco de ĉiuj nacioj de la Ĉina Popola Respubliko!
Vivu la Centra Popola Registaro!
Vivu Prezidanto Maŭ Ze-tung, la granda gvidanto de ĉiuj nacioj de Ĉinio!

La Usonaj Kaptitoj *Miniaturado de la Usona Armeo*

Teng Ŝu-seng (鄧蜀生)

La reganta klaso de Usono venendas la Usonan popolon per la "Usona vivmaniero," kaj samtempe faras la Usonan armeon senprecedence korupta, degenera, malklera, egoisma, mallaborema, malkuraĝa kaj kruela. En la Usonaj militkaptitoj kaptitaj de la Korea Popola Armeo kaj ĉinaj popolaj volontuloj ni vidas la miniaturon de tiu ĉi armeo.

Devigate de malfacila vivado kaj logate de alta salajro kaj luksa vivo multaj usonanoj iris al Koreio por servi kiel kanon-furaĝo. Pro manko de mon-rimedo, unu el la militkaptitoj nomita Robert, subskribis kontrakton kun Usona konskripta organizo ke ĝi pagu por li la kostojn de universitata studado, kaj post diplomigo li konskriptiĝu kiam ajn oni ordonos. La kvaran tagon post lia edziĝo li jam estis konskriptita kaj transportita al Koreio por la invadmilito. Multaj aliaj trompote de la anonco pri "senpaga vojaĝo," aliĝis al la armeo. La plej terura afero por ĉi tiuj soldatoj, kiuj soldatiĝis pro mono, senpaga vojaĝo aŭ solvo de vivproblemo, estas kompreneble batalado. Militkaptito de la 7a Divizio de Usona armeo diris: "La profesio militista estas tre bona dum paca tempo, sed ĝi estas tre malbona dum milita tempo." Tial tiuj dungitaj soldatoj sur la batal-kampo ĝenerale estas malkuraĝaj kaj malbatalemaj. Antaŭ ol iri al batalo, multaj soldatoj preĝas, ke ili ne estu mortigitaj. Kiam ili estis sieĝataj, sciiginte ke la Korea Popola Armeo kaj ĉinaj popolaj volontuloj estas tre indulgemaj al militkaptitoj, ili tuj kapitulacis. Post kiam ili estis kaptitaj, plej interesas ilin la demando, kiam la Korea Popola Armeo kaj ĉinaj popolaj volontuloj povos okupi Fusan-on, ke ili povu hejmen iri pli frue. Inter la militkaptitoj ofte ekestas tiaj famdiroj, ke la Korea Popola Armeo kaj ĉinaj popolaj volontuloj jam okupis Fusan-on, aŭ

ke la milito jam finiĝis. Tiuj onidiroj estas tre bonvenaj al la militkaptitoj, ĉar ili donas al ili konsolon.

Ekstrema korupteco kaj malnobleco en persona vivo estas la ĉefaj karakterizaĵoj de la Usona armeo. La ĉefa tasko de la "Speciala Servo" de Usona Armeo estas liverado de malĉastaj gazetoj kaj kavaliraj noveloj. Preskaŭ ĉiuj kaptitaj oficiroj kaj soldatoj de la Usona Armeo havas en siaj poŝoj fotojn de nudaj virinoj, malĉastajn bildojn kaj kontraŭinfektajn penisumojn kiuj estas



Amaso da Usonaj armeanoj kaptitaj.

rajtigita provizajo de Usona armeo. De tia volupta kaj korupta vivo la Usonaj soldatoj devas manĝi la maldolĉajn fruktojn. Laŭ la diro de subleŭtenanto Moss, kiam la 8a Armeo restadis en Japanio, la plej multo de la Usonaj oficiroj kaj soldatoj vizitis prostituejojn 5 ĝis 7 fojojn ĉiusemajne, kio ege malutilis al ilia sano, rekte malgrandigis ilian batalforton kaj rezistkapablon kontraŭ malsano. Post la kaptigo ili senhonte ŝteladas tabakfoliojn de la koreaj loĝantoj.

En la Usona armeo furoras vetludo. Estas ne maloftaĵo, ke oficiroj vetludas kune kun soldatoj.

Kiam elĉerpiĝis en vetludo ilia tuta mono, ili vetludis je fontanplumoj, brakhorloĝoj, kelkofoje eĉ je fotoj de nudaj virinoj. Post kiam ili estis kaptitaj, ili ankoraŭ kaŝe vetludas. Ĉar la Korea Popola Armeo kaj ĉinaj popolaj volontuloj ne konfiskas personajn posedaĵojn de la militkaptitoj, ili havas sufiĉan 'kapitalon' por vetludi. Iuj vetludas je mono, aliaj je tabako, kaj eĉ je manĝaĵo. Pro ilia ekstrema egoismo kaj vetludemo, okazis senfina ŝtelado. Kvankam vetludo kaj ŝtelado estas severe malpermesataj de la oficiroj de la barako de militkaptitoj, la manie vetludemaj kaj kutime ŝtelemaj militkaptitoj Usonaj neniam pentas sian hontindajn agojn. Sekve la administrantoj devis registri la monsumon de ĉiu el ili, kaj kontroladi pri tio regule. Se oni trovas ke tes monsumo pliiĝis aŭ malpliiĝis, oni tuj esploras pri la kaŭzo kaj severa riproĉo estas farata al la fiagantoj.

El la divers-naciaj militkaptitoj, la Usonaj estas la plej mallaboremaj. Ili sturmas en manĝado sed malviglas en laborado. Ĉiufoje, kiam ili supreniras monton por kolekti fajrolignon por kuirii siajn manĝojn, ĉiu el ili reportas nur kelkajn kilogramojn da fajroligno kaj neniam pli. Multaj el ili neniam uzas la viŝtukojn kaj sapon disdonitajn al ili de la aŭtoritato de militkaptita barako. Multaj el ili neniam sin lavis. Anstataŭ en la necesejo ili fekas kaj urinas ie ajn, eĉ en la dormoĉambro. Unu el ili, nomata Hert, eĉ fekis en sian pantalonon, kaj li estis tiel mallaborema, ke li ĝin ne lavis, sed promenadis senveste tien kaj reen.

La usonanoj edukitaj per la "Usona viv-maniero" estas tiel nekredible egoismaj. Pri la malsanaj kunuloj ili ne nur ne zorgas, sed forrabas iliajn vestojn kaj aliajn havaĵojn, utiligante la ŝancon kiam la malsanuloj ne havas forton por kontraŭstari. Tiu, kiu estas respondeca por alporti manĝaĵojn al la malsanaj militkaptitoj, mem formanĝas ĉion anstataŭ sendi al la malsanuloj. Je la 22a de aprilo Usona aeroplano bombis la militkaptitan barakon, kaj falinta konstruaĵo obstrukcis la enirejon de la rifuĝejo kontraŭ aeratako, kie rifuĝis dek Usonaj militkaptitoj. La laborantoj de la barako streĉe laboris por ilin elsavi, sed dume la Usonaj militkaptitoj apude starantaj ne nur ne helpis ilin savi, sed rapidis forpreni la lignaĵojn de la falinta konstruaĵo, ke dum certa tempo ili ne iru sur monton por kolekti fajrolignon. Naŭdek procentoj de la Usonaj oficiroj kaj soldatoj estas religiaj kredantoj, el kiuj multaj estas ridinde kaj kompatinde superstiĉaj kaj stultaj. Oni trovis ĉe ili amuletojn kun la jena surskribo: "Tiu, kiu kunportas tiun ĉi amuleton ne povas esti mortigita aŭ vundita de pafilo. Al tiu Dio donos mirindan povon... Al tiu ĉia pafilo, glavoj kaj bajoneto perdas la efikon..."

La senhontaj Usonaj invadistoj fanfaronas ke armilo decidas la venkon aŭ malvenkon de milito, sed samtempe ne povas ne trompi la soldatojn per amuleto kontraŭ pafilo, ke ili oferu por ili sian vivon.

La dungitaj, koruptaj, degeneraj, malsaĝaj Usonaj oficiroj kaj soldatoj estas tre malkuraĝaj antaŭ la Korea Popola Armeo kaj ĉinaj popolaj volontuloj, sed kruele kaj antaŭ la nearmitaj civiluloj, kaj ili fidele plenumas la komision de hombuĉado donitan de iliaj dungintoj. Tiu krimuloj edukitaj per la "Usona viv-maniero", similantaj al la germana kaj japana faŝistaj armeoj estas honto de la homaro. La grandaj ĉinaj volontuloj kaj Korea Popola Armeo traktas indulgeme la Usonajn militkaptitojn kaj penas plenumi la malfacilan taskon vekti ilian homecon per edukado. — **Howens**

Kiuj Estas la Plej Amindaj Homoj

Vej Vej (魏巍)



Heroa kamaradino el la ĉinaj volontuloj.

DUM la dua batalo en Koreio, trupo da ĉinaj volontuloj fulme rapidis malantaŭ la malamikojn por bari la vojon ĉe Kunvuli tra kiu la venkitaj malamikoj forkuros. Kiam ili atingis Sutangĉan, la kurantaj malamikoj ankaŭ ĝuste alvenis tien, kaj evidente baldaŭ forkuros laŭ la ŝoseo. La avangarda roto (3-a roto) de la trupo do rapide okupis malaltan kalvan monteton apud la ŝoseo, kaj baris la forkuron de la malamikoj.

Nun furioza batalado komenciĝis. Por forkuro, la malamikoj violente jetis sin sur la monteton per 32 aeroplanoj, dekkelke da tankoj kaj kolektivaj sturmoj. La tuta montsupro estis renversita, kaj flamoj de la gasolenbomboj brulruĝigis la pozicion de la roto. Tamen, sur la monteto kun fumo kaj fajro, laŭte kriante sloganojn la bravuloj de la ĉinaj volontuloj fojon post fojo mortigis la malamikojn antaŭ sia batalpozicio. Kiel garboj la malamikaj kadavroj amasiĝis antaŭ la monteto, kiu de sango jam ruĝigis. Sed la malamikoj ankoraŭ sturmis tuforte, por savi sian ĉefan batalforton de ekstermiĝo.

La batalo daŭris tutajn ok horojn. Fine, la kugloj de la bravuloj elberpigis. La suprenpuŝigintaj malamikoj okupis la monteton kaj premis ilin al la montpiedo. La gasolenbomboj faligitaj de la aeroplanoj ekbruligis iliajn vestojn. Tamen, dum tiu momento la bravuloj ankoraŭ persistis. Ili forjetis la pafilojn, kun fajro sibilanta sur vesto kaj kepo saltis al la malamikoj, ilin brakumis, kaj per la fajro sur siaj korpoj brulmortigis la malamikojn okupantajn ilian batalpozicion....

La estro de la batalono al kiu apartenas la roto diris al mi, ke post la batalado sur la batalpozicio de la roto dise kuŝis pafiloj frakasitaj, kaj pecoj de maŝinpaŝiloj disjetitaj sur la tuta monteto. La kadavroj de la bravuloj kuŝis en diversaj pozoj: iuj brakumis la malamikojn ĉe la talio aŭ ĉe la kapo; iuj per manoj forte ĉirkaŭpremite iliajn kolojn, la malamikojn teren faligis—ĉiuj kuŝis kaj bruligis kun la malamikoj. Alia bravulo kuŝis kun grenado ankoraŭ forte tenata en mano. Sur la grenado plenspruciĝis cerbajo de la Usona diablo kun li mortinta. Kaj alia

bravulo ankoraŭ tenis en sia buŝo orelepcon de malamiko.

Dum la enterigado de la martiroj, ĉar ili tiel forte brakumis la malamikojn per manoj interfingritaj, oni ilin disigis tre malfacile, kaj pro tio devis rompi iujn fingrojn de ili....

Kvankam la nombro de la vunditoj kaj mortintoj de la roto estis granda, tamen ili mortigis pli ol tricent malamikojn, kaj precipe, ilia batalado ebligis al nia ĉefa trupo alkuri kaj ekstermi ĉiujn malamikojn.

La batalonestro rakontis al mi pri la supredirita batalo. Lia parolo estis malrapida kaj sento peza. Li diris, ke li larmis kiam li enterigis la martirojn sur la batalkampoj. Sed li daŭrigis: "Vi ne pensu ke mi malĝojas pro ili. Ne, mi pro ili fieras! Mi sentas ke niaj batalantoj estas tiel grandaj kaj tiel amindaj. De ili mi ne povas ne esti tuŝata ĝis larmoj."

Amikoj, kion vi pensas aŭdinte tiun ĉi heroaĵon? Ĉu vi ne sentas ke niaj batalantoj estas amindaj? Ĉu vi ne sentas ke nia patrolando povas fieri pro tiuj herooj?

Kontraŭ la malamikoj niaj batalantoj estas tiel furiozaj, sed al la korea popolo ili estas tiel humanaj, tiel plenaj de profunda amo de internaciismo.

Sur la norda bordo de Han-Rivero mi renkontis junan batalanton nomatan Ma Ju-ŝiang (馬玉祥) kiu havas 21 jarojn ĉi-jare, kaj naskiĝis en Ĉingĉang-Gubernio (青島縣) en Hejlungĉiang (黑龍江) Provinco en Nordoriento. Kun nigra ruĝa vizaĝo kaj alteta staturto li staris tiel simplanima kaj aminda kiel ruĝa gaŭliango (speco de greno kun alta trunketo kaj ruĝa spiko) en aŭtuna kampo. Ĉar li ĵus venis de la batalpozicio, li aspektis iom laca, ankoraŭ kun ruĝaj vejnetoj en siaj okuloj.

Li komence apartenis al la artileria roto. Iun nokton, li vekigis de plorado, kaj kiam li eliris por rigardi, li vidis korean maljunulon ploranta sidante sur monteto. Ĉar post la detruigo de sia domo, ŝi restarigis kabanon inter la montoj, sed nun la kabano denove estis ruinigita de Usona bombo....

Reveninte li tuj iris al la rota stabo por peti transigi lin al infanteria roto. Pro la bezono de la infanteria roto li ricevis la permeson. Mi demandis lin: "Ĉu ne same vi povas ataki la malamikojn restante en la artileria roto?" "Ne, ne same," li respondis: "Ju pli proksime al la malamikoj, ni atakas despli kontente por venĝi la korean popolon."

Iun tagon dum la tagoj kaj noktoj sur la suda bordo de Han-Rivero,

li iris el la batalpozicio por kuiri. Kiam li ĵus eniris la vilaĝon, kelkaj malamikaj aeroplanoj alflugis, maŝinpaŝadis kaj jetis du grandajn brulbombojn, de kiuj kelkaj domoj ekbruligis kun densa fumo kaj fajro ke neniu povis alproksimiĝi al ili.

Nun li aŭdis infanan ploron el la fumo kaj fajro. Li tuj trakuris la densan fumon kaj proksimiĝinte li vidis mezaĝan korean viron kuŝanta en la korto. Sed la infanploro daŭris en la ĉambro. Li iris al la pordo, sed ĉe ĝi la fajro hurlanta malpermesis lin eniri. Jam bruligis la paperaj randoj de la pordo kaj fenestroj, kaj klare aŭdigis la infanploro elfluanta kun la densa fumtorento.

Kiam li rakontis ĝis tie, li diris: "Ĉu mi povis ne eniri? Ne, mi ne povis! Mi pensis, se mi renkontus tian okazaĵon en mia patrolando, mi povus eniri, kial mi povus ne eniri en Koreio? Ĉu ne sama estas la korea popolo kiel tiu de nia patrolando? Mi do malfermis la pordon per piedbato kaj ensaltis. Ho, densa griza fumo plenigis la tutan ĉambron, en kiu mi nur povis aŭdi la infanploron kaj nenium vidis. Miaj okuloj ne povis malfermiĝi pro la

kaj siaj okuloj jam fermiĝis. Trovinte ke ŝi estas ne savebla mi rapidis kuri el la pordo, estingis la fajron sur mi kaj ekprenis brakume la infanon sengepatran...."

Amikoj, kion vi denove pensas aŭdinte tiun rakonton? Ĉu vi ne sentas ke niaj batalantoj estas la plej amindaj homoj?

Ĉiu scias, ke la vivo sur la korea batalkampoj estas malfacilega. Sed kiel vivas tie niaj batalantoj? Iun fojon mi vidis batalanton manganta bakitan farunon kun neĝo en aerdefendejo. Mi demandis lin: "Ĉu vi ne sentas malkomforton?" Retenante la kuleron da neĝo enbuŝigota li respondis ekridetante: "Kial ne? Ni batalantoj de revolucia trupo ja ne estas mastroj! Sed ĝuste tio estas nia gloro." Li ekdemetis la kuleron kaj daŭrigis kun entuziasmo: "Ni prenu la mangandon de neĝo kiel ekzemplon: Ni mangas ĉi tie neĝon, ĝuste por ke la popolo en nia patrolando ne manĝu neĝon, ke ili povu sidi ĉirkaŭ forneto en hela ĉambro kaj teon trinkante manĝi kion ili volas." Li denove diris montrante la mallarĝan kaj malsekan aerdefendejon: "Por alia ekzemplo ni parolu pri la sinŝirmo en aerdefendejo.

Kiom sufoka ĝi estas! Vidante la varman sunon kaj glatan ŝoseon ekstere, mi tamen ne povas eliri. Sed mi restas ĉi tie en la aerdefendejo por ke la popolo en nia patrolando povu ne ŝirmi sin en aerdefendejo, sed iri trankvile sur la strato, kaj laŭvole bieklui, piediri aŭ promeni babilante. Kiel feliĉa estas tio! Tial," li remetis la neĝon en sian buŝon kaj diris kvazaŭ konklude, "estas por mi nenio ĉi tie sangi kaj suferi malkomforton!"

Mi denove demandis. "Ĉu vi nostalgias pri la patrolando?" Li ekridis, dirante: "Kiu ne nostalgias? Estas malsincere diri ne. Sed mi ne volas reiri, ĉar se mi reirus al la patrolando, kion mi respondus al la samlandanoj, se ili min demandus: 'Kiel vi plenumis la taskon kiun ni komisiis al vi? Se mi respondus: 'Restas ankoraŭ en Koreio duono luma kaj duono nigra', kion tio signifas krom honto?"

Mi daŭrigis demandi lin: "Kion vi postulas al la patrolando kaj Koreio travivinte tiom da danĝeroj kaj suferoj?" Li respondis post meditado: "Ni nenion postulas. Sed efektive—mi ne scias ĉu mi pravas—ni ŝatus ricevi objekton tiom grandan." Li ridis kaj per siaj fingroj faris rondan signon grandan kiel moneron. Por komprenigi min li klarigis: "Ni tre ĝojus reiri al nia patrolando kun Memoriga Insigno por la Liberigo de Koreio sur la brusto."



Ĉinaj volontuloj kaptas tankojn de Usona Armeo.

lignogravuraĵo de Li Hua

fumo kaj mia vizaĝo varmegiĝis kvazaŭ tranĉite. Mi ne scias ĉu mia vesto bruligis, kaj ne pripensante pri tio, mi palpis senorde sur la tero. Unue mi tuŝis plenkreskulon, kiu restis senmova post mia ekfiro, kaj mi palpis post la plenkreskulon. Nun mi tuŝis kruron de infano. Mi ekprenis ĝin en miajn brakojn kaj elsaltis el la pordo. Ja estas hela infano, mi vidis. Ĝi vestiĝis en mallonga jaketo kaj ploris kun nudaj kruretoj ŝvingantaj. Mi pensis en mi: "Spite vian ploron mi devas elsavi vian patrinojn, sen kiu neniu vivtenus vin!"

"Tiam la fajro despli furiozis, kaj ekbruligis la papero sur la muroj. Metinte la infanon sur la teron mi reenkuris la ĉambron tra la brulanta pordo. Mi ekiris la plenkreskulon, ŝi nur ekĝemis kaj ne plu moviĝis kontraŭ mia tiro. Alproksimiĝinte mi vidis sur sia vizaĝo sangon kiu malsuprenfluante ruĝigis la blankan veston antaŭ ŝia brusto.

Tradukis Espano

Karbomina Industrio en Nova Ĉinio

Ĉaŭ Ĉi (起棋)

La Ekspozicio pri Ĉina karboproduktado en la Laborista Kultura Palaco (勞動人民文化宮) en Pekino estas bona lernoĉambro de patriotismo por la amasoj. Hodiaŭ kiam pli kaj pli profundigas la kampanjo kontraŭ Usono kaj por Koreio, tia ekspozicio havas ja gravan signifon.

En la ekspozicio oni povas vidi kiel riĉan karbotrezoron posedas nia patrolando de Nordoriento ĝis Sud-Ĉinio, de la insulo Tajvan ĝis Sinkiang-Provinco (新疆省). Sole en Ŝansi-Provinco (山西省) la karbo subtera jam sufiĉas por provizadi la tutan mondon por pluraj jardekoj. Sed dum la lastaj cent jaroj, nia riĉega trezoro estis ekspluatata kaj rabata de la imperiistoj de Anglio, Belgio, Germanio, Cara Rusio, Japanio k.a. kaj la enlanda burokrata burĝaro. En ĉiu el la jaroj de 1842 ĝis 1931 pli ol 4.100.000 tunoj da karbo estis en Eŭropon forportitaj de la kapitalistoj. Post la Incidento de la 18a de Sept. en 1931, pli ol 390.000.000 tunoj da karbo estis forabitaj de la japanaj imperiistoj krom la kromproduktaĵoj. Pli poste niaj minejoj estis terure detruitaj de la Kuomintanga banditaro komplotante kun la Usonaj imperiistoj. En la malnova Ĉinio, la imperiistoj kaj la burokrata burĝaro laŭplacé pri-rabadis la karbominejojn tute nezorgante pri la sekureco de la minlaboristoj kaj malŝparo de la minrezoro. Kolono-sistemon ili aplikis en karbekspluatado kaj nur 35 procentojn de la karbotavolo ili elterigis. Kia malŝparo! La ministoj devis karbon hakadi per manpioĉo, kun malplena stomako, nuda korpo, kaj flagranta olelampo tenata per la buŝo, en la aermanka minejo plena de karbopulvoro. La karborokoj frotvundis ilian haŭton, kaj sur la karbopecojn gutis ilia sango. Gas-eksplozadaj akcidentoj fariĝis tiutempe preskau ĉiutage. Foje pli ol 1.200 ministoj estis mortigitaj en Fuŝun-karbominejo (抚顺煤礦) pro gas-eksplozido. Kiu peco el la milionoj da tunoj da karbo, kiun la imperiistoj forrabis de ni ĉiujare, ne portis la sangon de niaj karboministoj!

Tute nova stato estiĝis nur du jarojn post kiam tiujn ĉi minre-

zorojn la popolo metis sub sian zorgadon. Sur muro de la ekspoziciejo pendas grafikajo, kiu montras al la vizitantoj per dika linio skarlata, kian brilan rezultaton jam atingis la karboproduktado de Ĉinio post la liberigo: la tutlanda produktokvanto de 1950 superis tiun de la jaro 1947 je 21 procentoj, la produktivo pli grandiĝis je 56 procentoj, kaj la prezo de karbo malaltiĝis je 76 procentoj. Kio estas la kaŭzo? Ĉar la ministoj faris revolucion en la metodo de elminigo kaj atingis sukeeson.

Estas diversaj modeloj montrantaj la elminigon kaj transportadon de karbo. Starante inter tiuj modeloj, ni ne povas ne miri pri la rapida disvolvado de la karbo-industrio de nova Ĉinio. En multaj el niaj minejoj jam ĝenerale aplikigis la progresintaj metodoj de karboelminigo de Sovetunio. En kelkaj minhakejoj 40-100 metrojn longaj maŝinmetodo jam estas plene aplikata. Se la karbo estas tre malmola, tiam oni faras truon per pneŭmatika aŭ elektra drilo por ĝin disfendi per dinamito; se la karbo estas kompare mola, pneŭmatika pioĉo estas uzata por dehaki karbopecojn oblikve laŭ la vejnoj de la karbo. Unu sola ministro povas dehaki per pneŭmatika pioĉo pli ol 250 tunojn da karbo en 8 horoj. La laboristoj zorgantaj la transportadon povas rekte sendi la karbopecojn al la karbovagonoj per la elektraj ĉen-aŭ rimen-transportaj maŝinoj. Post la apliko de modernaj metodoj, ege grandiĝis la proporcio de la elterigebla karbo. Ĝenerale 85 procentoj de la karbotavolo povas esti elterigitaj.

Sekvante la plibonigon de la metodo de karbohakado, ankaŭ la transportaj sistemoj kaj instalaĵoj faris gigantan paŝon antaŭen. La elektra ledrimena transportilo estas unu el la plej modernaj. 800 tunojn da karbo ĝi povas transporti ĉiuhore de karbohakejoj trans 800 metrojn longa deklivo al karbo-lavejo kaj -selektejo. Tia transportilo jam ekzistis dum la japana okupado, sed ĝi estis detruita de la Kuomintanga banditaro. La laboristoj ne nur rapide ĝin riparigis kaj funkciigis, sed ankaŭ ĝin plibonigis. Antaŭe sur tia deklivo 800 metrojn longa cirkuladis

nur unu longega cirkulanta rimeno, kiu rondradis tage kaj nokte ĉu sur ĝi troviĝis karbo aŭ ne. Tio ne nur malŝparis elektron, sed ankaŭ kaŭzis, oftan rompiĝadon de la ledrimeno tro longa. Nun la laboristoj dividis la longegan rimemon en 12 mallongajn, kaj al ĉiu el ili kontrola aparato estis aldonita. Kiam ajn ne troviĝas karbo sur iu el la transportaj rimenoj, oni povas simple ĉesigi la cirkuladon de tiu rimeno. Per tio ambaŭ elekto kaj ledrimeno estas ŝparitaj. Tiu plibonigo de la maŝino grande malaltiĝis la elspezon de la minejo.

La elpensemo de la liberigitaj laboristoj estas granda kaj mirinda. Ĉiu el la modeloj de progresintaj karboproduktado kaj laboriloj manifestis la saĝon de la laboristaro. Apud la modelo de la ledrimena transportilo montriĝas modelo de moderna transporta maŝino surtera. Utiligante tian transportan maŝinon,

nur 3-6 laboristoj estas bezonataj por irigi la tuon surteran transportadon. En la ĉambro, kie ekspoziciejas diversaj maŝinoj, ni povas trovi ne nur la rekordokrean kavigan borilon inventitan de Li Ĉing-ŝuan (李慶蔚) kaj ankaŭ la plurborilan maŝinon de maŝinlaboristo Vu Ven-ĉiaŭ (吳文橋) per kiu oni povas fari en ŝtalan ladon samtempe 1-8 truojn sur cirklo de diametro 3-9.5 colojn longa. Ĉiuj ĉi inventaĵoj de la karboministoj alliveris tre oportunajn kondiĉojn por la prosperiĝo de karboproduktado.

La nova minad-metodo alportis novan vivon al la ministoj. Antaŭ la liberigo, la laboristoj ofte priskribis sin kiel "Peco da karno inter kvar rokoj", kaj sian vivon "Mangaĵo surtera, laboro infera!" Pelate de mizero la minlaboristoj devis laboregadi en ŝakto sen sekur-instalaĵo, kie ofte okazis enfalo de plafono, eksplozido de gaso, malsatmorto ktp., kaj ili estis kruele batataj kaj ekspluatataj de la feŭdaj laborbandmastroj aŭ spionaĵoj. Tage kaj nokte ili baraktadis sur la bordo de malsato kaj morto. Nun ĉio ŝanĝiĝis. La Popola Registaro ne nur ciam

Ĉeng Ĉung (鄭重):

KOMENCIĜAS FELIĈA VIVO

Prezidanto Maŭ,
La suno de ni
popol.
Prosperas eĉ
brutar.
Sub kares' de lia
varma kor.
La neĝsimila Ma
Pu-fang'.



Kamel-karavano de mongoloj en la Gobio.

Kruela la tiran',
Tuj degelis sub la suno for.
Jen sorto de l' satan'.


La supra poemeto estis elkantita de la popolanoj de kuolo-nacio (果洛族) unu el minoritatoj en Ĉinghaj-Provinco (青海省), kiuj estis fuĝintaj en Pajankara Montaron (巴顏喀喇山), la granda montaro en sudokcidenta parto de Ĉinghaj-Provinco, pro la kruela persekutado kaj buĉado fare de la militistaĉo Ma Pu-fang. Absolute izolite de la ekstera mondo ili pasigis tie nehoman vivon por 32 jaroj. Rizomo de sovaĝa herbo estis ilia sola manĝaĵo kaj bovsango la sola trinkaĵo. Antaŭ nelonge 43 personoj el ili por la unua fojo kolektiĝis kaj iris al la liberigita urbo Huangjuan (湟源) en Ĉinghaj trans montoj kaj riveroj kunportante pli ol 9.000 ĝinojn de lano. Ili interŝanĝis la lanono kontraŭ nutraĵo laŭ la favora prezo fiksita de la popola registaro. Pro tio ili estis tiel ĝojaj ke ili kantis sian ekstazon en la kanteto.

Fakte multegaj estas tiaj ekzemploj post la liberigo de la Nordokcidenta kaj Sudokcidenta regionoj kie loĝas la minoritatoj. "Prezidanto Maŭ venis, kaj la prezo de lano altiĝis!" "Prezidanto Maŭ estas nia granda Vivanta Budaŭ!" Tiaj paroloj jam disvastiĝis tra la stepoj kaj montaroj en la regionoj de minoritatoj. Dankeme ili diris: "La komerca politiko de Prezidanto Maŭ nia savis."

Vastegaj estas la Nordokcidento kaj Sudokcidento de Ĉinio, kie troviĝas grandnombro da ĉevaloj kaj bovoj kaj abundas riĉaĵoj ĉu surteraj ĉu

subteraj. En la Nordokcidentaj regionoj loĝataj de la frataj nacioj pli ol 90% el iliaj enspezoj venas el paŝtado kaj bredado. En la Sudokcidentaj regionoj kie loĝas frataj nacioj troviĝas multaj altvaloraj produktaĵoj, ekzemple, la 'ruĝa floro' (carthamus tinctorius) de Tibeto, la medikamentoj de okcidenta Seĉuan-Provinco (四川省), la mosko de Sikang-Provinco (西康省), la lako de Kuejĉoŭ-Provinco (貴州省) ktp. Ĉiuj tiuj produktaĵoj estas disvendataj kaj fame konataj ambaŭ enlande kaj eksterlande. Sed sub la sangaj regado de la banditaj klikoj de Ĉiang Kajŝek kaj Ma Pu-fang pezis la impostoj, oftis pri-rabadoj, malaperis karavanoj de komercistoj, sekve senombraj produktaĵoj fariĝis senvaloraj pro manko de merkato. La kampanjoj en Ningŝia-Provinco (寧夏省) nutris porkojn per azarolo (lycium chinense), tiuj en Kansu-Provinco (甘肅省) uzis ligustikon (ligusticum acutilobum) kiel brul-lignaĵojn; la tekkulturistoj en Jaan-Regiono (雅安區) de Sikang-Provinco senhelpe vidis siajn tekkulturojn dezertiĝantaj tagon post tago. Tial inter la lokaj kampanoj dum tiuj doloraj tagoj cirkuladas la vortoj "Por varoj ni trovas nenie merkaton, kun larmo ni devas toleri malsaton."

De post kiam la nordokcidenta kaj sudokcidenta regionoj estis liberigitaj unu post la alia, la politiko de la Ĉina Kompartio kaj Popola Registaro pri la naciaj minoritatoj pli kaj pli aplikigis al la regionoj de niaj frataj naciaj minoritatoj. La komercaj kadroj asignitaj al tiuj re-



Modernaj karbekspluatataj metodoj kaj instalaĵoj enkondukitaj

bonigadas la vivon de la ministoj, sed ankaŭ gvidas ilin bataladi kontraŭ akcidentoj pro malzorgo. En 1950 la nombro de vundigintoj kaj mortintoj malgrandiĝis je 50% ol en 1949. La akcidentoj pro malzorgo 89-procente malpliigis kompare kun tiuj de 1947. Granda estas tiu ĉi sukceso, kaj por ĝin atingi energian penadon oni faris. La minejoj estas ekipitaj de sub la ŝaktoj ĝis la surteraj laborejoj per serioj da sekurigaj instalaĵoj. Ankaŭ grandan armeon da specialistoj por sekurigi la minejojn nia Popola Registaro edukis: pasintjare, sole la minejoj en Nord-Ĉinio jam trejniis 4,751 tiajn specialistojn. Ankaŭ la oficistoj kaj laboristoj nun scias bone atenti pri la sekureco en la produktado. En Nordoriento, jam dum kvar tutaj jaroj okazis neniu vundiĝo aŭ mort-akcidento al la teamo de Ŝe Ju-haj (石玉海), glora standardo de sekura produktado.

Nun, feliĉa vivo jam komenciĝis por la laboristoj. En Nordoriento, ekzemple, novaj loĝejoj estis konstruitaj por unuopaj ministoj sur pli ol 216,000 kvadrataj metroj da tero kaj por la familioj de la ministoj sur pli ol 1,884,000 kvadrataj me-

troj da tero en la lastaj du jaroj. Krom tio, ankaŭ estis konstruitaj bone ekipitaj hospitaloj, sanigejoj, hejmoj por maljunuloj, elementaj lernejoj, infanvartejoj, teknikaj lernejoj, bibliotekoj, kinejoj kaj dancejoj. En belaj serenaj tagoj, la laboristoj povas ŝakludi en arb-ombroj, fiŝokadi ĉe riverbordo, kaj kanti ĉe verda lotuslageto post sia laboro. Refreŝiginte ili laboros pli energie.

"Unu vagono da karbo egalas al unu pafilo, la ŝaktaperturo kaj karbohakejo estas bataloj!" jen estas la giganta slogano etendiĝanta super la pordego de la ekspoziciejo, la bataljuro de la 450,000 ministoj en tuta Ĉinio, kiuj batalas en la kampanjo kontraŭ Usono kaj por Koreio por protekti sian feliĉan vivon. Patriota laborokonkurso ĉie disvastiĝas kaj novaj rekordoj kreiĝas unu post la alia. Manipulanto de pneŭmatika piĉo Li Kjun-ting (李君亭) jam kreis novan produktan rekordon de 258.7 tunoj da karbo en 8 horoj.

Jen kiel antaŭenmarŝis la karboindustrio de nova Ĉinio kaj certe ĝi pli rapide marŝos antaŭen.

—Esperantigis Laŭlum

POR LA MINORITATOJ

gionoj plene disvolvis la honorindan tradicion de persistemon kontraŭ ĉiuj suferoj kaj malfaciloj, plenumis la politikon de libera enlanda komerco kaj laŭeble helpis la ekonomian konstruon en la regionoj de frataj naciaj minoritatoj. La Komerca Kompanio de Junnan-Provinco (雲南省) enkondukis rimedon grandkvante aĉeti alterne en diversaj lokaj foiroj la lokajn produktaĵojn de la paŝtisto-kampanoj kaj provizis al ili industriajn produktaĵojn. La 90 familioj de lili-voj (栗堡) en Zavo-Vilaĝo (雜窩村) de Juanmo-Gubernio (元謀縣) en ĉi tiu provinco akiris pli ol 9,000 metrojn da ŝtofo por la memfarita kanaba tolo kiun la Komerca Kompanio aĉetis. Tio ne nur plene solvis la bezonon por la novaj vestoj de la vilaĝanoj, sed restas ankoraŭ ĉ. 100 metroj por ĉiu familio en la vilaĝo. La ŝtata komerca institucio en Tuŝan-Regiono (獨山區) de Kuejĉou-Provinco organizis 250 komercajn grupojn, kiuj aktive alportis ĉiutagajn necesajn kiel teon, salon, oleon, ŝtofon, ktp. profunden en la montvilaĝojn kaj urbetojn al la popolanoj de la frataj naciaj minoritatoj. La Sudokcidenta Sal-Buroo ankaŭ multmaniere klopodas liveri salon per starigo de diversaj agentejoj al la miaŭ-voj (苗) kaj ĵau-voj (侗), kiuj ofte ne gustumis salon por jaroj. La komerca Kompanio de Sikang-Provinco rigardis la starigon de komercaj rilatoj inter Sikang kaj Tibeto ĝia plej grava laboro kaj transportis al Tibeto de junio ĝis decembro lastjare tri centmil pakojn da teo (ĉiu pako pezas ĉ. 10 kilogramojn), per kiu ĝi interŝanĝis kaj elportis 150 tunojn da lano, mosko, borakso, ktp. el Tibeto. Tiamaniere ĝi sukcesis revigligi la jam delonge paralizigitan komercon inter Sikang kaj Tibeto, unuapase rompi la izolecon inter urboj kaj kamparoj kaj ebligis la vigligon de liberaj ekonomiaj rilatoj. Tial la komerca politiko de Prezidanto Maŭ estas varme aplaudata ĉie de la

frataj minoritatoj. Multaj el ili memvole ekprenis armilojn por protekti la vivojn kaj varojn de la komercaj grupoj dirante: "Koro pro koro kaj fero pro fero, ni diversaj nacioj nun fariĝas vera fratarao."

La komerca politiko de Prezidanto Maŭ estis vaste diskonigata tra la minoritataj regionoj. Samtempe karavanoj de la frataj nacioj ankaŭ aktive kaj konstante elportis siajn lokajn produktaĵojn. La hazakoj (哈薩克) de Kansu-Provinco kaj tibetanoj de Ĉinghaj-Provinco ĉiuj fervoras por la komerco kun hanoj. Al la komercaj centroj kiel Tunhuang (敦煌), Sining (西甯), Huangjuan (渾源), Kuejteh (貴德), Lanĉou (蘭州), Luĉou (瀘州), Kunming (昆明), Ĉungking (重慶), Kuejĵang (貴陽) k.a., konstante alfuladas karavanoj de la frataj naciaj minoritatoj kun diversspecaj naciaj kostumoj. La vartenejoj kaj gastejoj tiel malmulte okupitaj kaj frekventitaj nun tute ne povas kovri la bezonon. En Ting-juanĵing (定遠營) de Ningŝia-Provinco la komercaj entreprenoj por mongoloj kaj tibetanoj plimultiĝis de 27 ĝis 115, kaj en Ankang (安康) la transportaj entreprenoj kreskas de 30 ĝis 830. Unuvorte, ĉiuj komercistoj, transportistoj, vartenejoj kaj gastejoj, kiuj rilatiĝas kun la negoco de regionaj aŭ specialaj produktaĵoj nun multe prosperiĝas.

Nun la frataj naciaj minoritatoj jam komencis forskui sian malriĉan kaj mizeran vivon kaj suriri la vojon de abundo kaj feliĉo. Tion konvinke pruvas la ŝanĝo de

Klerigon Ili Sopiras

Ŝih Huan (石爨)

Foje mi vizitis mian amikon. En la babilado la patrino de la amiko, jam pli ol 50-jara maljunulino, subite min demandis: "Ĉu via patrino ankaŭ frekventas la vesperlernejon?" Tio tre mirigis min. Kaj mi devis diri al ŝi, ke mia patrino estas malproksime en la hejmovilaĝo kaj ke mi ne scias ĉu ŝi jam tion komencis aŭ ne. Tamen ŝi tre sincere diris al mi: "Tuj skribu al ŝi, ke ŝi vizitu vesperlernejon. Tie oni ja povos legi multajn librojn!"

Ŝi plue sciigis al mi, ke antaŭe ŝi povis nek skribi nek legi; sed nun ŝi jam povas skribi leteron kvankam ne tre facile. Poste ŝi montris al mi siajn skribajn ekzercojn kaj lupeon kiun ŝi uzas por skribado aŭ legado. Ŝi ankaŭ diris al mi, ke ĉiuvespere la najbarino en la orienta domo iras kun ŝi al la vesperlernejo ŝin subtenante je la brako.

Mi rigardis ĉi tiun maljunulinon: sulkoj jam interpretiĝas sur ŝia vizaĝo, la haroj ĉe la tempioj fariĝis grizaj kaj la buŝo jam iomete ŝrumpa. Sed ĉio ĉi tio neniel povis kaŝi la ĝojon elfluantan el la korfundo same kiel ĉe lernanto de elementa lernejo kiam li prezentas al aliu siajn ekzercojn.

Allian tagon mi vizitis iun librovendejon en la bazaro. Subite apud mi etendiĝis kala mano kaj karesis la bildrakontajn broŝurojn bele presitajn. Mi turnis mian kapon. Jen staris apud mi simpla kampano. Antaŭ tiom da libroj

li ravite ilin karesis kaj foliumis. Fine li ekprenis la broŝuron "La Ĝojo post Liberigo", pasigis por ĝi kaj foriris ĝin tenante kaj foliumante kun granda ĝojo.

Mi okulsekvis la kampanon ĝis kiam lia figuro malaperis en la homamaso. Mi pensis, ke antaŭe ĉi tiuj du kalaj manoj povis rilati ja nur kun ŝpato kaj tero. Sed hodiaŭ ili jam komencas tuŝi libron.

Same hieraŭ vespere kiam finiĝis la publika akuza kunveno de la kvartalo, la kamaradoj de la Sinhua-Librejo kunportante broŝurojn pri la movado kontraŭ Usono kaj por Koreio. Tuj svarmis ĉirkaŭ ili triciklistoj, kolportistoj, dommastrumaj virinoj kaj maljunulinoj kun siaj etaj nepinoj kaj formiĝis dika muro de homoj ĉirkaŭ la provizora librovendejo.

Mi pensis: Antaŭe kun la mono ili ja nur povis konkure sin enpremi en la vicon antaŭ la provizejo por aĉeti iom da matza faruno. Sed hodiaŭ ĝi estas uzata por libroj.

Nun neniu plu povas konsideri tiajn faktojn kiel hazardajn. Ĉina socio jam ŝanĝiĝis radikale. Tute prave Prezidanto Maŭ Ze-tung diris en la malferma parolado por la Politika Konsiliga Konferenco: "Jam pasis la tempo, en kiu ĉinoj estis rigardataj kiel necivilizitaj, kaj ni baldaŭ aperos en la mondo kiel popolo kun alta kulturo."

Trad. Ŝjimin

komparaj valoroj inter produktaĵoj de agrokulturo kaj paŝtado kaj produktaĵoj industriaj antaŭ kaj post la liberigo. La nunaj prezoj de lano, felo kaj aliaj regionaj produktaĵoj en paŝteja regionoj de Ĉinghaj-Provinco estas ĝenerale okoble pli altaj ol tiuj antaŭ la liberigo. En Sinkiang-Provinco unu ĝino da lano povis interŝanĝi nur unu ĝinon da faruno antaŭ la liberigo, sed nun kvar ĝinojn. Dum la rezistmilito kontraŭ Japanio, unu tano (egalas 100 ĝinojn) da lano en Sikang povis interŝanĝi tri pakojn da teo, sed nun ok. La Nordokcidenta Fel-kaj Lan-Kompanio aĉetis lastjare pli ol 24,000,000 ĝinojn da lano, kio egalvaloras al 36,680,000 metroj da ŝtofo. Ĉi estas la plej granda enspezo de la

paŝtejaj nacioj de la Nordokcidento en sia historio.

Mirinda estas la kresko de la aĉetpovo de la minoritataj fratoj. En multaj urboj de Ningŝia, Ĉinghaj kaj Kansu, altiĝas pli ol duoble la vendkvanto de ŝtofo, rizo, faruno kaj aliaj nutraĵoj, plejparto el ili estas aĉetita de la minoritataj fratoj. Okulfrapas ĉie en la kamparo de Ĉinghaj la nova fenomeno de "domkonstruado, vestokudrado, brut-aĉeto kaj pliigo de novaj terkulturoj". La mizera vivo de "senolea kaj sensala mangado, senvataj vintraj vestoj kaj senbruta plugado" jam pasis kaj pasis por ĉiam. Iu lamao de Ĉonitieh Tribo (卓尼羣部落), diris: "La Vivanta Budao en la templo donis al ni nemon, sed Prezidanto Maŭ ebligis al ni bonan mangadon kaj vestadon. Li estas nia vera Vivanta Budao." Sonraziron (松拉才郎), tibetano en Templo Gubom Gomba (塔爾寺) de Huangĉung (滄中) verkis la poemon "Prikantu Prezidanton Maŭ," kiu trafe eldiras la dankemon kaj impreson de la frataj minoritatoj post la liberigo. Jen estas ĝia traduko:

"Belverdas la pinoj sur montoj.
Torentas rivero kun ondoj.
La sunaj radioj nin ame karesas.
Korzorgon de Maŭ ni neniam forgesas."

* 馬步芳, militistaĉo kiu tirane regis Ĉinghaj-Provincon por multaj jaroj.

† 漢族, la plej granda nacio en Ĉinio.



Miaŭoj en la foirotago. lignogravuraĵo de Liu Pingĉih

Historio de Fera Ĉeno

Lu Ĉih (魯芝)



LA sabata posttagmezo estis libera tempo. La kamaradoj okupis sin per flikado, lavado aŭ aerumado de tolaĵoj kaj litkovriloj.

Subpelotonestro Li Hung-kuej (李洪奎) prenis sian pakajon el la konservejoj, metis ĝin zorgeme sur la kuŝejon kaj malligis singarde. Li kontrolis la entenaĵojn unu post alia, serĉante ĉemizon por anstataŭi la malpuran.

"Ha! La subpelotonestro venis ja de la laborista klaso. Kiel bonorde li aranĝis ĉion en la pakajo—pantalono kun pantalono kaj jaketo kun jaketo:—" laŭte kriis Lianĉjo (小良子), irona eksteren tiumomente. Tion aŭdinte ne malmulte da kamaradoj tuj alsvarmis kun scivolemo. Iuj ĉesis flikadi kaj aliaj kuris kun la hararo kovrita de sapŝaŭmo.

"Petolemulo!" diris la subpelotonestro ridante kaj fingrominacante al Lianĉjo. Li eltiris la ĉemizon rapide, sed neatendite io falis klake el la pakajo.

"Ha! Kio estas tio?" Lianĉjo levis de la tero feran ĉenon konsistantan el kvin aŭ ses ringoj.

"Donu al mi, ne estu petola!" Seriozige la mieno de la subpelotonestro.

"Kian utilon havas ĝi! Rigardu! viaj vestaĵoj estas malpurigitaj de rusto." Lianĉjo ĵetis samtempe la feran ĉenon ekster la fenestron.

"Vi aĉuleto!" ekstaris la subpelotonestro, fingrominacante al Lianĉjo kaj piedbatante ĉagrenite. Li forlasis la pakajon kaj rapidis en la korton kaj reportis la ĉenon.

Tio forte mirigis la ĉestantojn kaj ĉiuj vetdemandis:

"Kio estas?"

"Kian utilon la feraĉo havas por vi?"

"Vi ne komprenas," diris Li Hung-kuej, tenante la feran ĉenon en la mano. "Historio kuŝas en ĝi."

"Kia historio?"

"Pri ĝi..." Li Hung-kuej daŭrigis post momenta ĉpensigo: "Bone, mi rakontu al vi hodiaŭ vespere."

Li jam ne ŝanĝos sian ĉemizon, sed zorgeme frotis la feran ĉenon per tolpeco por frotpurigi kanonon. Poste li ĝin bone envolvis en la pako, kun longa ĝemspiro.

Tie kuŝis historio...

Vespere komenciĝis kunsido en la subpelotono; la ĉefa programero estis la rakontado de la subpelotonestro.

Ili kolektis iom da mono, kaj aĉetis per ĝi arakidojn, sunflorajn semojn, malto-sukeraĵon kaj du paketojn da cigaredoj. La komiso por aĉetado falis sur Lianĉjon, ĉar

lia poŝmono jam elĉerpigis. Laŭ lia propra dirado, tio signifis: "Pagu kiu havas monon kaj laboru kiu havas forton."

Antaŭ ol la rakontado komenciĝis, Lianĉjo

proponis, ke oni metu aparte la porcion por la subpelotonestro, ĉar li timis, ke tiu ne havos tempon por manĝi dum rakontado.

Li Hung-kuej forpuŝis la rezervitan por li porcion da arakidoj kaj diris: "Mi ne tre ŝatas tion, vi kune manĝu!" Li elprenis paperan pakajeton el sia poŝo kaj ekrakontis: "Nun mi komencu..."

"Ĉiufoje, kiam mi estis petita pleniĝi la registran liston de militisto, mi ĉiam embarasiĝis pro mia klasa deveno. Diru, ĉu mi apartenis al la laboristaro aŭ la terkulturistaro? Mi posedis terpecon hejme, kaj miaj prapatroj vivtenis sin per farmo, eĉ mi mem ne forĵetis la plugilon. Kiam la terlaboro bezonis min, mi petis forpermeson kaj hejmeniris de la fervojo—mi estis laboristo sur la Cangŝou-ŝeĉiaĉuang-fervojo (倉石路). Iu diris, ke mi staras kun unu piedo sur la bovstalo kaj alia sur la fervojo. Diru, ĉu mi povus skribi tion sur la listo?"

"Mi petis konsilon de la politika direktoro. Sed ankaŭ li ne trovis ĝustan solvon. Fine mi priskribis min kiel laboristo-terkulturisto. Mi devenis de la laboristo-terkulturista amaso kaj mia klasa deveno estas laboristo-terkulturisto."

"En la malnova socio, laboristoj kaj terkulturistoj vivis mizerege. Tion ĉi bone konas sen klarigo. Nun mi rakontu al vi la historion de la ĉeno..."

"En mia infanaĝo, patrino foje ŝtele venigis blindan sortodiveniston. La ulo puŝetis nian pordeton, enflaris la mucidan odoron de la litajoj en la domo kaj parolis:

"Sortodivenistoj ne scias ĉirkaŭparolon, kaj gentilhomoj demandas ne pri feliĉo, sed pri malfeliĉo. Metalo, ligno, akvo, fajro kaj tero: el la kvin elementoj, metalo estas la eterna malbeno de via familio!"

"Jes ja! Mia avo, fosante por la terposedanto, lasis preteratente la malbone fiksitajn klingon fali sur lian kapon kaj mortis. Oni enterigis lin envolvita en mato. Mia patro, en la jaro kiam mi dungigis al la fervojo, estis vundita de frapo de la fera tenilo de rullelvilo kaj vomis sangon. Li malsanis dum multaj jaroj kaj restis kripulo ĝis la morto."

"Mi ne kredas je sorto. Kio ne estas farata de homo? La komuna diraĵo, ke ĉion decidas la sorto, estas sensecaĵo. Laŭ mia opinio, se oni kondukas juste, kaj faras ĉion laŭ sia konscienco, ĉiu vojo estas malfermita por li. Mi estis fervoja laboristo. Tenante en mano 'kejlono', kiu similas nek pioĉon nek martelon, mi iris tien ĉi tien por esplori. Mi laboris pli

multe kiam la laboro urgis, alie mi laboris malpli. Krome mi farmis terpecon. Per tio ĉi, mi vivtenis miajn patrinon, edzinon kaj infanon."

"La japanaj diablidoj okupis Nordan Ĉinion. Mi pensis: ĉie estas same por perlabori sian vivadon. Mi laboros por tiu, kiu pagos. Por mi estas tute egale. Do mi restis kaj daŭrigis laboron trankvile."

"Tamen la cirkonstanco ĉiujare pli malboniĝis kaj estis same malfacile por la laboristoj. Unu jaron antaŭ la kapitulacio de la japanoj, krom la malabundeco pro la sekegeco, mi ankaŭ perlaboris malmulte sur la fervojo. Miksaĵo-faruno, ŝtopis la inteston tiel, ke oni ne povis eligi fekaĵon eĉ kun premitaj pugnoj!"

"Kun malplena ventro neniu povis labori! Iun tagon, la japana kontrolisto vidis ke Surduleto ripozis tie, sendis du policanojn kaj lin forportis. En la stacio baldaŭ aperis oficiala anonco, ke Surduleto intencis saboti kaj estas komunista."

"Kvankam ni ne vidis komunistojn kaj la 8a-vojan Armeon, tamen ni pli malpli konsciis ke la 8a-voja Armeo ne estas teruraj demonoj, kiajn la japanoj priskribis. Ili estis ja trupoj batalantaj kontraŭ la japanoj. Mi ne aligis al ili tiam, ĉar, unue mi devis prizorgi mian familion, kaj due mi ne sciis kie trovi la 8a-vojan Armeon. Sed la ĉefa kaŭzo estis ke mi ankoraŭ malbone konis la Komunistan Partion kaj la 8a-vojan Armeon."

"Nun Surduleto estis la sola subtenanto de sia familio, kiu konsistis el paralizita patrino kaj vidvina fratino kun infano. Ilia vivo dependis de la laboro de Surduleto. Do lia morto signifas la morton de tuta la kvaroj. Ni ĉiuj petis por li pardonon, sed ĉia klapodo pruvis vana. Apenaŭ revenis la propetantoj, Surduleto estis mortpafita de la malbenitaj diablidoj!"

"La laboristoj furiozigiĝis kaj volis striki!"

"Sed ĉu striko estis ebla? Neeble. Pafilo kun brilanta bajoneto sekvis ĉiun laboriston. Kiu strikus, tiu ricevus nepran morton!"

"Ni larmis ŝtele. Kiam ni renkontis nin, ni interrigardis per ŝvelantaj okuloj kaj kuragiĝis diri nenion. Poste ni interkonsiligis kaj decidis kolekti iom da mono kaj sendi ĝin al lia patrino ĉiumonate. Neniu ja kuragiĝis sciigi sin pri lia morto..."

"Neeble estis striki, aŭ eĉ paroli, do ni restu tiel senage? Neni! Ĝin nokton, ni kolektiĝis kaj iris ŝtele

al la fervojo—ni volis ĝin detru! Mi kaŭrigis, frapetis la relojn kaj palpis la reltrabojn. Ĉiujn tiujn metis tie niaj propraj manoj. Mi konis ilin tiel bone kiel patrino sian infanon. Mi sciis, kiu relo bezonas anstataŭigon kaj kiu trabo havas sur si tuberon... Nun mi mem detruos ilin! Mi, kiu ĝin konstruis, nun detruos ĝin memvole! Mi ploris subvoce. Ardaj larmoj falis senĉese laŭ la vangoj.

"Kiel spertuloj, ni finis ĉion tre rapide. Post tio, kelkaj kamaradoj ekvojaĝis por aliĝi al la 8a-voja Armeo. Inter ili estis Li Ju-te (李玉德), mia plej intima amiko. Li demandis, ĉu mi iros kune. Mi hezitis. Mi memoris pri mia patrino, mia edzino, kiu vivis konkorde kun mi, kaj mia infano, kiu scipovis simple plorkrii. Ilia vivo dependis de mia laboro. Se mi forirus, kiam ni povus min revidi? Mi diris al Li Ju-te, ke mi ne povas iri kun li."

"Ni manpremis kun la forvojaĝantoj kaj diris nenion. Ni larmis silente. Antaŭ ni estis senlima mallumo. Kiu kuragiĝis pensi pri la estonteco?"

"La sekvantan tagon, la japano kunvokis la laboristojn en granda korto. Li kriis kaj saltis kolere, fikante siajn sangostreitajn okulojn al la laboristoj. Li volis eltrovi la detruintojn de la fervojo."

"Ĉiuj staris senparole..."

"Subite iu mano kaptis je la brusto de mia vesto kaj tiris min el la vico. Ekzumo en mia kapo. Mi kredis, ke ĉio estas finita por mi. Sed mi tuj retransviligis."

"Diru, vi!" diris la diablido en balbuta ĉina lingvo kaj kun gestoj. "Se vi ne dirus, vi estus dekapigita!"

"Mi diris nenion..."

"Rapide!" Samtempe li montris fingre la amason: "Kiu?"

"Mi diris nenion kiel antaŭe..."

"Vi ne diras? he?" Li ridis kun grimaco kaj peza frapo trafis mian



Kunlaboru Tutmondaj Esperantistoj!

Traduko, represo, resumoj kaj ĉiumanieraj utiligoj de materialoj en nia bulteno estas permesataj kaj dezirataj kondiĉe ke ili ne estos malice kripligitaj kaj la utiliginto plenumos niajn jenajn petojn:

1) Post la traduko, represo, resumoj aŭ aliaj utiligoj rimarki aparte el kiu numero de nia bulteno ĝi estas tradukita ktp.

2) *Sendi al ni 4 ekzemplerojn* de la traduko, represo aŭ resumoj kaj sur ili noti el kiu numero kaj kiu artikolo ĝi estas tradukita ktp.

3) Sciigi al ni kia estas la ĵurnalo aŭ gazeto, sur kiu aperis la traduko, represo, aŭ resumoj kaj, se eble, kiom da legantoj ĝi posedas.

Se iu el vi, karaj samideanoj, interesiĝas pri Popola Ĉinio, bone utiligas niajn materialojn kaj volas pli multe informiĝi, sciigu al ni vian bezonon kaj ni volonte vin provizos laŭeble.

"Plej bona propagando estas praktiko". Estas jam tempo por antaŭenpuŝi nian movadon al pli alta stadio ol nur propagandi. Kunlaboru, ĉiuj esperantistoj tra la tuta mondo:
La Red.

vangon. "Vi diras nenion?" Refoja survango. "Vi diras nenion?" Refoja kaj refoja battoj...

"Miaj vangoj komence doloris, poste fariĝis sensentaj kaj ŝveligis. Mi forlekis la sangon sur la buŝangulo kaj komencis ŝirmi min per brako. En tiuj jaroj, ne parolu pri kontraŭbato, eĉ ŝirmi sin per brako estis krimo.

"Mi estis forportita. La kamaradoj rigardis senkonsile. Komence mi estis portita al la japana kazino. Tie mi unue konis kiel gustas sidi sur la punilo 'Tigro-benĉo' kaj kiel gustas kapsika suko, kiun oni enverŝis en miajn naztruojn kaj poste mi elvomis kune kun sango. Mi ne scias, kiom da fojoj mi tiam mortis!

"Poste oni sendis min al la malliberejo en Ŝekiaĉuang (石家莊) Ambaŭ miaj manoj kaj piedoj estis metitaj en katenoj. La metala klakado akompanis min kien ajn mi iris! Tagoj pasis kvazaŭ jaroj. Mi estis enfermita en karceron, sur kies pordo estis signotabulo kun la vortoj: politikaj arestitoj. En tiu karceron oni manĝis, dormis, fekis kaj urinis, kaj ne povis vidi la ĉielon kaj sunon. Ĉio, kion mi vidis tie, estis nur la muroj, la ferkradigitaj fenestroj, la gardisto, la vipo kaj la katenoj.

"Kiu ne estis enkarcerigitaj, neniam sciis kiom grandaj estas la cimoj.

"Foje mia edzino iris min viziti. Ŝi havis malordan hararon kaj flavan vizaĝon. Ŝi portis kun si la malgrasan skeletosimilan infanon.

"Ŝi ploris. Sed mi ne povis plori. Kion mi povus diri? Ŝi informis min ŝtele, ke venis letero de Li Ju-te kaj ke "tie" li laboras bonege. Mi

pentis, mi pentis! Sed kian utilon havas la pento? Jam estis tro malfrue!

"En tiu vespero mi pensis pri tio kaj alio. Mi palpis la feran ĉenon kiu min katenis. Ĉu ĉiu generacio de mia familio estas kondamnita al la kateno kiel antaŭdiris la blinda sortodivenisto? Mi memoris mian infanon, memoris lian mienon kiam li vokis min paĉjo. Ĉu la sama sorto atendas lin kiel min? Li ja apartenas al la juna generacio!"

Li Hung-kuej paŭzis kaj trinkis. Estis Lianĉjo, kiu ekploris kun klinita kaŝo.

Daŭrigota

Trairejo No. 6 — Laborista Teatraĵo

En *Trairejo N-ro 6* (六號門), la plej bona laborista teatraĵo en 1950, oni vidas kiel vivis kaj penadis la ĉinaj transportistoj kaj kiel ili venke akiris sian liberecon. Ĝi estas rakonto pri vivo reala, sed artiste koncentrigita. La aktoroj fakte travivas siajn rolojn, kaj pro tio, la impresoj al la rigardantaro posedas tian specialan kvaliton de streĉeco kaj kortuŝeco, kian ni antaŭe vidis en *Glacirivero Degelis* (千年冰河開了漢), teatraĵo verkita kaj prezentita de liberigitaj prostituitinoj en Pekino.

La fakto de tiuj ĉi 17 scenoj okazis en la Orienta Stacio por Varoj en Tienzin. Ĉiuj ŝvitantaj transportistoj ĉe Trairejo N-ro 6 estas sub la bruta subpremado de bandmastro Ma Kin-lung (馬金龍) kiu ekspluatas 90 procentojn de ilia laborpago. Ma Kin-lung bezonas multe da mono. Li vivas lukse kaj multo donacas kiel subaĉeton al la pligrandaj Kuomintangaj aviduloj. Hu Er (胡二), honesta kaj diligenta laboristo, estas nur unu el tiuj kiuj reduktiĝis al ekstrema malriĉeco pro eldevigo de la bandmastro. Lia patrino estas mortanta, lia edzino suferas malsanon kaj lia infano, malsaton. Sed kiam li petas Ma por parto de sia salajro, Ma lin maldungigas kaj registras lian nomon en nigran liston. Forvondinte ĉion vendeblan en la domo, en la mal-espero Hu Er povas vendi nur sian infanon, por aĉeti medikamenton por sia patrino. Tio estas sankciita de Konfucia etiko, sed ŝiras la koron de lia edzino. Tamen kiam li revenas hejmen kun la medikamento, lia patrino jam mortis.

Tiu ĉi tragedio vekas la kaŝitan koleregon de la laboristoj, sed kiam unu el ili, impulsema Vuĉjo (ウチ), protestas, la bandmastro tuj kulpigas lin komunisto kaj la friponaj lakeoj lin ĝismorte batas, por timigi la ceterajn laboristojn.

La barbaraj, tamen, ricevas efikon tute malan ol li intencis. La laboristoj ribelas. Helpate de vera komunista subtera laboranto, ili organizas strikon kiu disvastiĝas en la tuta Tienzina transportistaro. Por la unua fojo, bandmastro Ma alfrontas nerompeblan, solidan unuecon de la proletaro, kaj li vole-ne-vole cedas.

La dramo originale finiĝis je ĉi tiu unua venko de la laboristaro, sed aŭdiĝis insistaj petoj pri la post-liberiga sekvo. Tiel la Dua Akto estas verkita. Hu Er provas organizi transportgrupon de liberaj laboristoj. Sed tio ne estas tre facila. Iuj el la laboristoj estas ankoraŭ sub

la regado de la bandmastro. Hu, tamen, refoje akiras helpojn de lia komunista amiko Jang (楊); la grupo estas organizita kaj kun granda sukceso. Pli multe da laboristoj aliĝas. Sed bandmastro Ma ne estas homo rezignacia pri sia fiasko. Li eklopodas por frakasi la grupon. Li minacas la malpli decidemajn anojn. Ankoraŭ kredante ke mono estas ĉiopova, li sendas unu el siaj sekvantoj al Pekino kun oro por subaĉeti. Kiam tiu ulo revenas kaj raportas pri sia fiasko, Ma, koleriĝas kaj tuj decidis plenumi la ordonon de la Kuomintanga sekreterio mortigi Kamaradon Jang. Tamen, ĉe surpriza fino, la laboristoj malkovras kaj frakasas la intrigon, kaj Ma mem estas kaptitita, kaj transdonata al la popola Tribunalo.

Tio estas la rakonto de *Trairejo N-ro 6*—vera rakonto. En julio, 1950, transportistoj de Tienzin, sub la gvido de la Popola Registaro, estis inter la unuaj kiuj renversis siajn bandmastrojn kaj pretendis siajn rajtojn. Vigla movado por fini la bandlaboran sistemon iniciatiĝis en la transporta metio. Por pli bone komuniki siajn spertojn al la aliaj, la laboristoj de Trairejo N-ro 6 decidis ilin elskribi. Kvin profesiaj verkistoj venis por helpi. Je tri posttagmezoj okazis "Akuzaj Kunvenoj" en kiuj la laboristoj priparolis pri la krimoj de la bandmastroj. Kruda materialo de la teatraĵo tiel formiĝis. En diskutadoj dum 24 posttagmezoj, ili prikonsideris la materialon kaj decidis kion enskribi en la teatraĵo. Post ĉiu diskuto, ili tuj ludis la scenon skizitan. Ĉiu laboristo parolis sian propran parton. Tiel ili rekordis la gustan lingvon de la laboristoj.

Tiu ĉi aŭtentikeco sendube fariĝas la sekreto de la sukceso de la teatraĵo. La verkistoj mem estis la batalantoj en la luktoj kiujn ili priskribas. La dramulantoj mem estas transportistoj. Oni apenaŭ povas diri ke ili ludas; ĉar ili ja ripetas kion ili travivis en siaj propraj vivoj, kaj esprimas siajn proprajn amojn kaj malamojn.

En aŭgusto 1950, la teatraĵo estis por la unua fojo prezentita al la publiko en la Kultura Palaco por Laboristoj en Tienzino. Ĝi rikoltis tujan sukceson. La rigardantaro estis ekstreme kortuŝita. Ĝin vi-

dinte, la transportistoj komentis, "Neniu noto estas malvera. Tiuj vortoj estas prenitaj el niaj propraj koroj." La rigardantaro travivis ĉiun momenton de la agado. La mortigo de Vuĉjo ĉiufoje elvokis kriojn de "For la laboraj bandmastroj!" Pli ol 120.000 homoj rigardis la 60 prezentadojn en Tienzino. Kalkulate kune kun tiuj en Pekino, Taku kaj Tangku, la nombro de prezentadoj atingis 111 kaj tiu de rigardantoj pli ol 194.000.

Per kio oni mezuras valoron de teatraĵo? Ĝi devas esti la grado kiom ĝi helpas al la antaŭeniro de historio, kaj nun en Ĉinio, la grado kiom ĝi helpas al la grandega laboro de novdemokratia revolucio. *Trairejo N-ro 6* estas, en ĉiuj flankoj, sukcesa teatraĵo. Ĝi jam helpas milojn da laboristoj rompi siajn katenojn. Post prezentado de la teatraĵo multaj "Akuzkunvenoj" estas okazigitaj por malkovri la ceterajn bandmastrojn. Dum mallonga tempo post la liberigo la bandmastroj en Tangku (塘沽) fervoja stacio oriente de Tienzino, ankoraŭ povis subpremi tieajn laboristojn. Sed tri tagojn post la prezentado de *Trairejo N-ro 6* en tiu stacio dek bandmastroj estis senditaj al la policejo de lokaj laboristoj.

En februaro, 1951, rigardantoj en Pekino akceptis la teatraĵon kun egala ekscito kaj entuzismo.

Ekster la Pekina Teatro, en kiu prezentis tiu teatraĵo, estis reklamo por *Trairejo N-ro 6*. Iu maljuna transporta laboristo, elrinte de la prezento momenton haltis antaŭ, ĝi. Pripenseme li legis la vortojn kaj poste, kun peĉeto da krajono aldonis: "Ni estis ŝarĝbestoj estinte. Nur nun ni estas veraj homoj!"

Censinio.

Guna Virino*

Ĉu King-hua (朱靖華)

Sur la korea batalkampoj,
Neflokoj, kvazaŭ najloj,
Vizaĝon pikas frape,
La aeroplanoj malamika
Rondflugas superkape.
Kanonoj muĝas kaj ĉirkaŭe
Obusoj pluvus kun obstino.
Sed jen virino
Premas kadavron de infano morta
Per ambaŭ manoj al la sino.
Kun sentimeco
Ŝiaj okuloj larmoplenaj brilas
Kaj sen ĉirkaŭrigardo ŝi nur iras,
kaj iras!

Iu demandas ŝin zorgeme:
"Ĉu restas ĉe vi alia familiano?"
Ŝi iras sen rerigardo,
Sed ŝia voĉ' malforta tremas jam:
"Sole la patro de l'infano!..."
Tiu demandas plue:
"Ĉu hejme estas lia patro?"
Kvazaŭ leono furioza
Kun tondra voĉ' ekhurlas ŝi:
"Nun kia tempo estas?
"Ĉu hejme resti povas li?
Kiam infanon nian karan
Mortigis la Usona aeroplano,
Li jam aliĝis antaŭlonge al armeo
Kaj luktas nun kun malamikoj
Manon al mano!
Dum mi mem kuros al la fronto
Kun la infan-kadavro ĉe la sin,
Kaj tranĉos la demonan manon
Por venĝi la infanon!
Por venĝi lin!"

Elĉinigi Doma.

*Vera historioto en la milito kontraŭ Usona invado en Koreio



El la sceno de "Trairejo No 6": la bandmastro minacas patrinon de iu transportisto.

Japana Popolo Batalas kontraŭ Koloniigo Ankaŭ en Kulturaĵoj Kampoj

Karaj estimataj k-doĵ.

Ni elkore ĝojas kaj dankas sciinte brilantan konstruadon en nova Ĉinio kaj heroan bataladon de viaj volontuloj en Koreio por sekureco de Azio kaj la tuta mondo.

En Japanio ĉiutage plej ofte priparolataj temoj estas minaco de milito kaj terure pezaj impostoj. La reaktia pupa Joŝida registaro,

helpata de Usonaj imperiistoj, furiozas altiri la japanan popolon al invada milito. Sed la japanoj, kiuj spertis terurajn atombombojn kaj vidas mizerajn viktimojn el Koreio antaŭ siaj okuloj, estas vekigantaj kaj malamas la milit-provokantojn. Eĉ anoj de "rezerva polico" multe forkuras el sia vico kaj 90% el ili rifuzas iri al milito.

Petskribo por la ĉiufanka packontrakto kaj opozicio kontraŭ rearmado, iniciate de la Japana Kompartio, disvolvigas en vastaj popolamasoj. Patri-perfidantaj faŝistoj, nun penas subpremi porpacan sopiron de la popolo kaj aresti centojn da patriotoj tra la lando, kiuj distribuas demokratiajn ĵurnalojn: "Voko de Paco", "Popola Ĵurnalo" ktp.

Lastatempe Dulles, lakeo de Usonaj imperiistoj, publikigis strukturon de aparta pae-traktato. La devo de ni, demokratoj fariĝis pli grava kaj ni daŭrigos diversmaniere militrezistan batalon. Nun, en Japanio, regas la kolonia kulturo. Ĉie troviĝas brua jazo kaj filmoj fie erotikaj kaj groteskaj. Ĉiuj informaj organizoj, radio, ĵurnaloj, filmoj estas mobilizataj por degenerigi la junulojn kaj pereigi ilian patriotismon. Por produkti nacian kulturon progresemaj

laboristoj kaj intelektuloj brave luktas. Precipe en Kina Rondaro, kiu kalkulas 60 mil membrojn, nun komenciĝas la kreo de nia propra filmo: "Ho, Ja Ni Estas Vivantaj", kiu temas pri mizera vivo de taglaboristoj. La kapitalo kolektiĝis el filmamatoroj kaj la filmo aperos ne malpli frue ol en majo. Ni, anoj de K.R. penis krei ĝin spite de monto da obstrukcioj.

La scenaro estis multfoje devigita aliformiĝi laŭ ordono de reaktia cenzura oficejo pro ĝia tro viveca esprimo de laborista vivo.

Nun reaktiaj policanoj ankoraŭ malhelpas filmi ĝin. Sed ni nepre elkreos ĝin kaj ĝi restos en historio de filmmovado kiel glora venko de film-laboristoj kaj rigardantoj.

Same en Japanio "Demokrata Junulara Koro" klopodas forpeli dekadencajn kantojn kaj pleniĝi Japanion per helaj kaj konstruemaj kantoj de la laborista klaso. Ĝis antaŭ kelkaj jaroj ni eĉ ne revis kiel helaj kaj esperplenaj estas Sovetiaj popolaj kantoj, kiel kuragiĝaj kaj konstruemaj estas kantoj de Ĉinio kaj aliaj demokratiaj landoj. DJK, sub la slogano "kreu nian nacian popolkanton" eniris ĉiajn fabrikojn kaj vilaĝojn kaj kuragiĝas laboristan batalon kontraŭ kapitalistoj. DJK ankaŭ prezentis kantojn de tuta mondo antaŭ miloj de laboristoj okaze de Maja Tago. Ĝi eldonas "Utageo" (kant-voko), kiu enhavas muzikajn verkojn de la tuta mondo kaj aliajn artikolojn.

Suprediritaĵ movadoj estas nur ekzemploj de demokrata lukto kontraŭ koloniiga politiko.

Kun frateca solidareco salutas
Esperanto-Grupo de N.E.S.
el Japanio

LA fosilioj de "Pekina Homo" antaŭ 500,000 jaroj estas valorregaj materialoj por studo de la prahomoj en Ĉinio. En la rezistmilito ili estis forŝtelitaj de la japanaj kaj poste de la Usonaj imperiistoj. Por pli bone studi la prahistorion de Ĉinio ekde la 12a de majo ĉe Ĉoukou-tian (周口店) de Fangsan-Gubernio (房山縣) en Hopej-Provincio rekomenciĝis la fosado gvidata de ĉinaj arkeologoj Jang Ĉung-kian (楊鍾健), Pej Ven-ĉung (裴文中) kaj Kia Lan-po (賈蘭坡) Riĉan rikolton ili jam akiris kvankam nur en mallonga tempo. Unu mueldento de la prahomo kaj sennombraj ŝtonaĵoj, branĉoj kaj ostoj de simioj, cervoj kaj aliaj prabestoj estas trovitaj.

EN la konkurso de laboristaj literaturaj verkoj kaj teatraĵoj patronata de la Federacio de Pekinaj Literaturaj kaj Artaj Laborantoj kaj la Unio de Laboristaj Sindikatoj de Pekino. Oni ricevis multajn verkojn de la laboristoj ĝis lasta monato. Inter

ili estas 126 novejoj, poemoj, prozoj kaj ritmaj rakontoj, 62 teatraĵoj verkoj, 24 kantoj, 2 dancoj kaj 320 pentraĵoj. El la sennombraj verkoj oni povas rimarki, ke la laboristoj sopiras esprimi sian vivon per literaturaj formoj, kaj pruviĝis, ke la laboristoj havas kapablon verki kaj iagrade mastras diversajn literaturajn formojn. Eminentaj el la 534 verkoj estas elektitaj kaj nun unu post alia aperas sur la literatura felietono de Sinmin-Tagjurnalo (新報 populara tagjurnalo en Pekino) kaj la premiotaj verkoj aperos sur "Pekina Literaturo." (北京文藝), la organo de la Federacio de Pekinaj Literaturaj kaj Artaj Laborantoj.

JE la 28a de lasta monato malfermiĝis Ekspozicio de Nova Ĉeĥoslovakio en la Laborista Kultura Palaco de Pekino. La malferman ceremonion ĉeestis pli ol 200 personoj inkluzive vic-ĉefministron Kuo Mo-ĵo kaj membrojn de diplomatia korpuso, kaj la literaturistoj kaj artistoj en Pekino. S-ro Weiskopf, ambasadoro de Ĉeĥoslovakio kaj k-do Kuo Mo-ĵo, vic-ĉefministro de

PAGU AL NIAJ PERANTOJ

- Aŭstralio:** Steve Bennett, Flat 3, 62 Brighton Av., Croydon Park, N. S. W.
- Austrio:** Franz Haiderer, VIEN, 10, Friedrich Knauergasse 2/1/1/6.
- Belgio:** Walraevens Rajmundo, Rabelais Strato, 10 Bruselo. (Jarabono: 50 bfr.)
- Britlando:** F-ino F. Paraige, 10 Woronzow Road, St. John's Wood, London, N. W. 8. (Jarabono 6 ang. ŝil.)
Collet's Subscription Department, 40 Great Russell Street, London, W. C. 1.
- Ĉeĥoslovakio:** Slovaka Esperanto-Instituto, T. S. Martin, Kuzmany-str. 29. CSR-Slovakio. (jarabono 50 kĉs.)
Burda Rudolf, Plzen-palackeho N. ĉĉ,
- Finnlando:** Niilo Kavenius, Niklaksenkatu 10/14 Turku. (Jarabono: 300 Fmk.)
- Francio:** Labor-Esperantista Federacio, 34, Str. Chabrol-PARIS—X. (CCP. Paris 902-52) (Jarabono: Fr. Fr. 350)
- Germanio:** Arthur Schulze, Berlin-Lübars, Kolonie, Waldes-frieden 77. (Jarabono: 6 D.M.)
Erich Rödel, Leipzig W. 33, Becherstr. 10.
- Hungario:** KULTURA, Budapeŝt, V. Akademia u. 10. (Jarabono 20 forintoj)
- Italio:** Itala Laborista Esperanto-Asocio, Via Modena 33—Torino. (Jarabono: 400 liroj)
- Izraelio:** Beneion H. Danon, Kibuc Afikim. (Jarabono: 400 prutoj)
- Nederlando:** Esperanto-Grupo Vaals, Pr. Bernhard-str. 4 Vaals.
- Norvegio:** Norvega Esperantisto, Redaksjonen, Boks 942, Oslo. (Jarabono 6 kronoj)
- Pollando:** Isaj Dratwer.—Asocio de Esperantistoj en Pollando Warszawa Marszalkowska 81/32 (Poŝteka konto P.K.O. I 8266/115) (Jarabono 12 zł.)
- Rumanio:** Rumana Esperantista Societo, București I, Bulev. 6 Martie 15, et. I. (Jarabono: 120 lejoj)
- Svedio:** Einar Adamson, Värmlandsgatan 18, Göteborg. (Jarabono 6.50 kronoj)

- Rim.*
- 1) Senpagan specimenon ni sendos al ĉiu, kiu letere postulos. Se iu volas regule ricevi nian gazeton, pagu laŭ la supra tarifo.
 - 2) Legantoj en ceteraj landoj povas aboni nian gazeton ankaŭ ĉe iu el la supraj perantoj al kiu li trovas rimedon pagi aŭ rekte ĉe nia adminstracio per internaciaj respond-kuponoj (1 respond-kupono por ĉiu ekzemplero) aŭ samvaloraj novaj esperantaj libroj, sed de individuaj legantoj ni ne akceptas gazetojn.
 - 3) Korospondan anoncon ni ne akceptas pro manko de spaco.

國內定價：每期基價一元五角。全年十二期基價十八元。平寄郵費在內。掛號另加。

la Ĉina Popola Respubliko ambaŭ parolis pri la signifo de la ekspozicio. En ĝi troviĝas modeloj de fabrikoj, maŝinoj, divers-specaj industriaj produktaĵoj, lignogravuraĵoj kaj skulptaĵoj. La tempo de la ekspozicio daŭros ĝis la fino de junio en Pekino kaj poste translokiĝos al Ŝanhajo. Ĝi certe donos grandan helpon al la ĉina popolo en la komprenigo de la historia, socia, politika kaj kultura disvolviĝo de Ĉeĥoslovakio kaj pli intimigos la kunlaboron de tiuj ĉi frataj popoloj.

DE la 15a ĝis la 25a de aprilo okazis en Pekino la unua konferenco pri edukaj laboroj de tutlandaj sindikatoj. Ĝi fermiĝis sukcese kun gravaj decidoj pri edukado de politiko, kulturo kaj tekniko al la laboristoj. En la konferenco oni unue kontrolis la sukcesojn akiritajn en lasta jaro. Poste okazis detala diskutado pri plua disvolvo kaj fine decidis: 1) Unuhora lernado pri revolucia teorio en ĉiu dua semajno estu garantiata por analfabetaj laboristoj kaj unuhora lernado en ĉiu semajno por la laboristoj leg-scipo-

2) Politika klerigado al la laboristoj estu intime ligota kun la aktualaj cirkonstancoj. 3) Teknika kaj kultura instruado estu intensigita. Oni devos mobilizi almenaŭ 1,500,000 laboristojn al la lernado en kuranta jaro. La nunaj analfabetoj en ĉiuj industrioj devas esti edukotaj en 2 ĝis 4 jaroj ĝis tia grado ke ili povos legi la popularajn legajojn

DOR ĉeesti la muzikan feston "Printempo de Praha" (21. majo) de Ĉeĥoslovakio, je la 11a de majo ekveturis al Praha la Ĉina Deleĝacio, kies membroj estas famaj ĉinaj muzikistoj Ma Se-cung (馬思聰), Ju Ji-ŝĵuan (喻宜賢), An Po (安波), Kuo Lan-ĵing (郭蘭英), Ĉou Kuang-ĵen (周廣仁), Tu Ming-sin (杜鳴心), Pian Kjun (邊軍) kaj Liu Kuang-ĵue (劉廣月) estrata de Ma Se-cung. Laŭ la programo multaj ĉinaj muzikaĵoj estos prezentataj en la festo. Inter ili troviĝas: soloj de popolaj muzikiloj, kanto-soloj, piano-ludo, solo de fraŭlino Ju Ji-ŝĵuan, violono de s-ro Ma Se-cung kaj aliaj komponaĵoj de ĉinaj muzikistoj.